

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francalandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO-DECEMBRO

1975 6

KULTURAJ KAJEROJ

1975 NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Delfo — Apolono

La Horn-Kab-Velŝipoj

Prelegoj de Grésillon :

« Homo kaj maŝino »

Ventmueliloj kaj ventmuelejoj en la Mondo (fino) L. Chasseriaud.

La tekniko kontraŭ la individuo

La Fiŝkaptisto kaj la spirito F. Dalmèth
Trad. P. Balkanyi

Klariginda letero Bukar

Por via distro.

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Pluraj el niaj geamikoj eksterlandaj jam informis nin pri sia intenco viziti Grésillon en 1976 antaŭ ol koni la programon. Tio multe plezurigas nin ĉar ne nur la aktivaĵoj sed ankaŭ la kontaktoj, la etoso allogas ilin.

Ni speciale alvokas geinstruistojn, por ke ili akompanu kelkajn el siaj lernantoj 9-15 jaraj al Grésillon de la 21-a ĝis la 29-a de marto. Tie kaj tiam renkontiĝos infanoj el diversaj landoj kaj studos, ludos kune pere de Esperanto.

INFORMIĜU.

La someraj periodoj multe similos la pasintjarajn, krom ŝanĝeto, aŭ pli ĝuste aldono, en la programo de la dua periodo. Kutime tiuj « Internaciaj Semajnoj » estas dediĉitaj al diverstemaj prelegoj. Kompreneble ankaŭ en 1976. Sed lastan jaron kelkaj samideanoj, kies edzino aŭ infanoj ne sufiĉe scipovis la lingvon aŭ tute ne konis ĝin, bedaŭris, ke ne estis organizata kurso. En 1976 tia kurso, rektmetoda, ekzistos. Tiamaniere la gesamideanoj kiuj hezitas restadi kun familianoj ne scipovantaj la lingvon estos certaj, ke la tuta familio trovos intereson en la ĉeesto.

Kiel la antaŭajn jarojn la aliĝintoj, kiuj intencas restadi dum tuta periodo, t.e. dum tri semajnoj de la unua ĝis la lasta tago de tiu periodo povos pagi malplikostan restadon, kondiĉe ke la tuta sumo estos sendita almenaŭ du semajnojn antaŭ la komenciĝo de la elektita periodo.

Tuj petu la programon. Planu viajn feriojn kaj rapide rezervu vian ĉambron. Jam kvardeko de personoj sin anoncis por la unua periodo ! Ne tro atendu.



KULTURAJ KAJEROJ

deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn tagojn dum la venonta jaro.

Esperanto tra la Mondo

KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ EN 1976

— Internacia Esperantista Vintra Feriado, en Maria Alm (Aŭstrio), 17 — 31 a de Januaro. Inf. : Finkenzeller, Stiegerg. 6/22, A-1150 Wien.

— Ski-Semajno, en La Molina (Hispanio), 8 — 13 a de Februaro. Inf. : H.E.F.A., Rondo San Antonio, 46/50, 2º 4a Barcelona 11. Inf. en Francujo : Marcel Pilleboue, 16, rue de Bellevue, 78600 Mesnil-Le-Roi.

— Kongreso de la fervojistoj, 12 — 18 a de Junio, en Skelleftea (Svedio).

— Internaciaj Feriaj Kursoj, 18 — 24 a de Julio, en Helsinger (Danio). Inf. : Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000, Helsinger.

— Internacia Renkontiĝo Naturamika, 18 — 27 a de Julio, en Abaliget (Hungario). Inf. : I.R.N., H-7601 Pecs Pf2, Hungario.

— Junulara Kongreso, 24 — 31 a de Julio, en Tesaloniko (Greklando). Inf. : UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo — 3002, Nederlando. (Sama adreso kiel por la 61a Universala Kongreso, 31a de Julio — 7a de Aŭgusto, en Ateno).

— Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.), 24 — 31 a de Aŭgusto, en Göteborg (Svedio).

— Franca Kongreso de Esperanto, 16 — 20 a de Aprilo (Pasko), en La Grande Motte (Hérault). Adreso : S-ino Negron, 22 Chemin du Mas Blanc, 34400 Lunel, Francio.

— Kongreso de SAT-Amikaro, 17-19a de Aprilo, en Artigues, apud Bordeaux. Inf. : Robert Léo, 11, rue des Frères Lumières, 33150 Cenon.

GRAVA INTERNACIA KUNVENO DE FREINET-EDUKISTOJ

Dum la unua duono de Aŭgusto 1976, okazos en Pollando, verŝajne proksime de Varsovio, Internacia Renkonto de Freinet-Edukistoj (RIDEF), en kiu Esperanto estos efektive laborlingvo kiel la aliaj elektitaj lingvoj. Jam, la aliĝoj de diverslandaj geesperantistoj estas certigitaj. Estas do esence ke tiuj aliĝoj estu kiel eble plej mutaj.

La koncernataj edukistoj estas petataj rapide rilati kun S-ro Jean Marin, 9, rue Adrien-Lejeune, 93170 Bagnolet, Francio.

Cetere, staĝo kun Esperanto-kurso okazos en la Esperantista kulturdomo de la Kastelo Grésillon, Baugé 49150 Francio, inter la 2a kaj la 23a de Julio por prepari konvene la ĉeestadon en RIDEF.

Skribante al S-ro Marin, indiki ĉu la nivelo de sia Esperanto-scipovo estas alta, meza, malalta.

AVIADILO NOMITA « ZAMENHOF »

La polaj aerlinioj Lot nomis unu el siaj aviadiloj, Jeto TU-134, kiu flugas super Eŭropo, « Ludwik Zamenhof ».

LA LINGVO INTERNACIA KAJ LA KIBERNETIKO

Du el la dekkvar laborgrupoj de G.P.I. (Internacia Societo pri programita instruado kaj klerig-didaktiko), nome « Interlingvistiko kaj lingvokibernetiko » kaj « Kibernetiko en klerigteknologio », kaj ankaŭ diversaj kibernetikaj kaj klerigsciencaj revuoj uzas ekde kelkaj monatoj la internacian lingvon, almenaŭ por la resumoj de siaj publikaĵoj.

Pri tiu fako, la interesatoj estas petataj rilati kun S-ro Hermann Behrmann, laborgrupo de GPI « Interlingvistiko kaj lingvokibernetiko ». D-479, Paderborn, Riemstr. 62, Federala Germanio.

MONDCIVITANOJ KAJ ESPERANTO

En la kongreso de la mondcivitanoj kaj de la mondfederalistoj en San Francisko, dum Julio, ĉeestantaj esperantistoj sukcesis voĉdonigi favoran rezolucion pri Esperanto, sed necesas ke multe pli da esperantistoj interesiĝu pri la mondcivitana movado, kies idealo estas tre proksima de la celoj de esperantistoj.

Rilati kun R. Volpelière, 10, rue de la Servie, 30000 Nîmes (Francio).

INTERLINGVISTIKO EN SOVETUNIO

En Sovetunio jam de unu jaro ekzistas aktiva programo de esplorado pri interlingvistiko. Temas pri la agado de la grupo pri demandoj de internacia helplingvo, starigita de la Instituto de Lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj en 1974.

La grupo havas kiel membrojn, ok lingvistojn.

Eldono de libroj pri la problemo estas antaŭvidata.

En intervjuo de S-ro Isajev samtempe gvidanto de la grupo kaj prezidanto de la komitato pri la internaciaj interrilatoj de la sovetaj esperantistoj kiu aperis en « Hungara Vivo », S-ro Isajev deklaris ke la grupo ekzamenis pli ol sescent projektojn kaj lingvosistemojn kaj konkludis ke « sole Esperanto estas vivkapabla, eĉ perfekta internacia lingvo ».

Li aldonis ke li opinias « ke maturiĝas la planoj pri la fondo de Soveta Esperanto-Asocio ».

ALVOKO AL GEOGRAFOJ-ESPERANTISTOJ

Prof. David Armand, Mal. Kaluĵskaja 12, Kv 24, SU 117071 Moskvo, USSR) alvokas ĉiujn geografojn-esperantistojn esprimi sian deziron kunlabori en organizota geografia sekcio de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista).

EN UNIVERSITATOJ DE LA AMERIKA KONTINENTO

— La Universitato de Baltimoro (Marilando), Usono, kun subteno de la ŝtata edukdepartemento de Marilando, organizis 3-semajnan intensivan esperanto-kurson por lingvo-instruistoj. Poste estis decidite daŭrigi la studadon kaj plue subvencii ĝin. Ĉiuj studintoj intencis komenci instruadon de Esperanto en siaj lernejoj.

— En Medellin (Kolombio), 79 gelernantoj partoprenis la Esperanto-kursojn en la Universitato Pontifika Bolivarjana. En tri fakultatoj de tiu-ĉi universitato, la studentoj rajtas elekti Esperanton inter pluraj fremdaj lingvoj.

— Jam por la sepa jaro, S-ro William Auld, la konata esperantista poeto, estas invitita al Usono instrui venontjare, dum Julio, Esperanton ĉe la San Francisko ŝtat-universitato.

NOVAJ LIBROJ

— « Iracema » romano de la brazila verkisto José de Alencar (1829-1877), tradukita de B. Siva.

— « Mia verda breviero », novelaro de Jean Forge.

— Enciklopedia vortaro Esperanto-Jida, de Rusak (2 voluma enciklopedio, kun 640 paĝoj).

— « Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko » (1931). Reeldono de la verko de Wüster.

DELFO - APOLONO

Delfo estas ĉi tie, kvazaŭ enfiksita sur la lastaj deklivoj de monto Parnaso. Supre, mallarĝa fendo disigas du apikajn klifojn, la Fedriadojn ; el tiu fendo fontas la akvo de Kastalio.

Aliflanke ravinoj descendas ĝis la gorĝo de la riverego Pleistos, transe de kiu la monto Kirfis montras siajn disŝiritajn flankojn. En la mezo vasta ebenaĵo, kie la olivarboj, grandaj kiel centjaraj kverkoj, ondas ĝis ltea, ĉe marbordo. Estas la fama ebenaĵo Krisa, konsekrita al Apolono.

En tiu « kruda valeto », ofte la Naturo montriĝis kruela : tertremoj, terfaloj elŝiritaj el la Fedriadoj. Sed ankaŭ kvietiganta estas, en la malproksimo, tiu maro de olivarboj, kiu kuniĝas kun la bluo de la ĉielo kaj la bluo de la maro. La enorma pezo de la montoj maltrankviligas la homan koron, sed espero naskiĝas el tiuj foraj horizontoj.

Fronte al tiu Naturo, kelkfoje bonvola, ofte malfavora, la homo sentis miron, timon, respekton ; li sentis sian malfortecon ; li konsciis la ĉeeston de IU pli potenca ol li, la ĉeeston de Aliulo, de unu Dio, tie, kaj ĉi tie, en la ŝtono, en la akvo, en la arbo, en la besto.

KAJ MITOJ NASKIĜIS

Jen ŝtonamaso, rande de pado ; estas la « Herma » ; ĝi aperas kiel trankviliga gvidosigno en malbone konata regiono. La preteriranto dankeme aldonas pluan ŝtonon, eĉ nutraĵan oferdonon, por alia vojaĝanto aŭ por la Aliulo. Pli poste oni estos certa, ke bonfarema dio vizitadas tiun Hermaion por kuraĝigi la pasantojn ; li estos Hermeso, la gvidanto de la vojaĝantoj, la kondukanto de la animoj sur la malfacilaj vojoj de la subteraj inferaj regionoj, loĝejo de la mortintoj.

La akvo estas kapricema ; kelkfoje ĝi mankas. La riveregoj, raraj, fekundas la kampojn. Tial ili estas kultitaj. Heziodo, la Kamparano, rekomendas : « Antaŭ ol trairi riveron, oni ne forgesu fari preĝon, purigi siajn manojn ; oni ne urinu je ĝia enfluejo nek je ĝiaj fontoj ». La rivero havas sian propran diaĵon ; ĝi estas impetega : estas taŭro kun homa vizaĝo aŭ ĉevalo. Pozidono estas tiu dio-ĉevalo kaj ankaŭ tiu de la tertremoj, ĉar oni kredas, ke la multaj riveroj, kiuj enabismiĝas en la grundon kaj reaperas pli malproksime, erodas la teron kaj okazigas sismajn skuojn. Pozidono, dio de la tero, dio de la rivero estos ankaŭ dio de la Maro. La Centaŭroj, « tiuj akvo-vipantoj » estas la ĝenioj de la montaj torentoj.

Unu viro vojiras tra abaro : bela arbo haltigas lin ; estas la arbo, kiu edziĝas kun la Tero kaj transdonas ĝiajn murmurojn. En Dodono la pastroj, nudpiedaj, sorbiĝas je la teraj fluoj kaj kultas la sanktajn kverkojn. Besto elkuras el bosko kaj timigas la pasanton ; tute apude fonto murmuras kaj kuraĝigas kiel bonfarema persono. La fekundeco de la Naturo ĉie eksplodas ; ĝi estas atribuita al la nimfoj kaj al la Diino Tera.

Kiam venas la vespero, la homo eniras en sian kavernon, en sian kabanon, en kiu kune vivas homoj kaj bestoj. Estas ŝirmejo, estas sekureco kontraŭ la timiga nokto, kontraŭ ĉio, kio ĉirkaŭe vagas ; en la mezo fajro varma kaj luma ; estas amaso da lignokarbo inkandeska sen fumo nek flamo, kiun oni zorge konservas, kovrante ĝin per blankaj cindroj. En la komenco tiu fajro estis lokita en truo fosita en la tero ; poste oni ĝin lokis sur ronda tripieda tablo : estas la tripiedo. La diino, gardantino de la fajro estos Hestia, kiu ĉiam ricevos la unuan viktimon de ĉiu oferbuĉado. En Delfo tiu lignokarboamaso iĝos la « ŝtono por la fajro », kiun oni uzis ekstere de la kabano ; Centro de la ĉiutaga vivo, ĝi iĝos la Centro de la Mondo : estos la « Omfalos, la Umbiliko de la Tero ».

Antaŭ la 2-a miljaro, en Pito, la unua nomo de Delfo, la praloĝantoj adoris Gaja, la nutrantan Teron, en kiun ili entombigis siajn mortintojn. Gaja esprimiĝis per la murmuroj de la arboj, de la akvoj, per haladzoj, kies interpretado permesis al la Pitio orakoli : sur la varmegajn cindrojn de la fajro oni metis hordeojn, kanabon, laŭrfoliojn ; la fumo okazigis delirojn, kiujn oni konsideris profetaj en la buŝo de la Pitio.


La Serpento Pitono estas fabela besto, naskita de la Tero, sur kiu ĝi rampis, en kiu ĝi loĝis ; ĝi korpigis la Terajn Fortojn. Piede de Parnaso, ĝi defendis la sanktejon de Gaja kaj ŝian orakolon.


Piede de la Tholos, konsekrita al Atena, oni trovis multajn terakotajn statuetojn de la Diino Tera ; ilin akompanis taŭroj, simbolo de la generanta elemento.

La triboj elvenintaj el Malgranda Azio (Akajanoj, Tonanoj, Dorianoj) kunportis kun si la diojn kaj diinojn de siaj originaj landoj ; inter ili Zeŭso, suna dio ; liaj multaj edziĝoj kun la lokalaj Ter-Diinoj konkretigas la triumfon de la patriarkeco super la matriarkeco. Post alveno de la Dorianoj, ĉielaj kultoj aldoniĝis al la teraj kultoj, ne ilin neniigante.

MITOLOGIO RIĈIĜIS KAJ LEGENDOJ NASKIĜIS

Gaja, la Tero kaj Ouranos, la ĉielo geedziĝis kaj naskis 6 Titanojn kaj 6 Titaninojn (inter kiuj Altas, Kronos,





Rea, Temisa) Fratoj kaj fratinoj siavice edziĝis kaj naskis la 6 Olimpanojn (el kiuj Zeŭso, Pozidono, Hadeso).

Por iĝi mastro de la mondo, Zeŭso, kun helpo de Prometeo kaj de la Ciklopoj, kiuj donis al li la fulmon, devas venki la Titanojn, kiuj ribelis. Zeŭso sendas ilin en la Tartaron. Tiu lukto, la « Titanomakio » multe inspiris la grekajn skulptistojn.

Jam de la 13-a jarcento, la micenaj epigrafaj tekstoj entenas la nomon de pluraj diaĵoj, sed sen iaj ajn precizigoj. Estas Homero, en siaj epopeoj, kiu donis al ĉiu dio precizajn karakterizaĵojn. Sur la monto Olimpo li arigis multegon da diaĵoj, en komunumon similan al la patriarka micena organizo. Ili estis kvazaŭ elito de klasa socio kun homaj virtoj kaj malvirtoj ; « ili kapablis ĉiujn agojn, ŝtelojn, adultojn, trompojn, kiuj alportas al la homoj nur riproĉojn kaj mallaŭdojn ». Tamen la homoj sentis sin malfortaj kontraŭ tiuj diaĵoj nemortemaj kaj dotitaj je supernaturaj povoj.

Zeŭso estis ankoraŭ devigata lukti kontraŭ la Gigantoj (laŭ la instigo de Gaja, kiu volis konservi sian potencon, Kronos, ŝia filo, kastras Ouranos, sian patron. La sango de Ouranos fekundas la Teron, kiu naskigas la Gigantojn). Tiuj Gigantoj kun enorma korpo kaj serpenta vosto, havas terurigan aspekton. Ili atakas la Olimpanojn. Tiu « Gigantomakio », kutima temo de la greka skulptarto *simbolas la venkon de humanigita religio super la primitivaj kultoj.*

Jen Zeŭso mastro de la Universo. Estas la triumfo de la universala suvereneco super la politeismo. Li estras la Teron ; li konfidas la Maron al Pozidono kaj la Subteran Mondon al Hadeso. El la ekstremaĵoj de la Universo li ellasas du aglojn (tiuj birdoj, kiuj povas fronte rigardi la Sunon). Ili renkontiĝas en tiu ebenaĵo Krisa. Ilia renkontiĝo signas, ke, ĉi tie, estas la Centro de la Mondo. En la muzeo, la Omfalos atestas tiun kredon. En la festaj tagoj, oni ĝin kultas ; oni ĝin oleoŝmiras kaj oni ĝin ĉirkaŭas per reto da bendeletoj ; oni diras, ke Pitono, sub ĝi dormas.

KAJ VENIS APOLONO

Li estis nomata ankaŭ Febo, la Puriganto, la greka dio de la Suno kaj Lumo.

Mitologio : Li estas la filo de Zeŭso kaj de Leto-a. Leto estas filino de getitanoj kaj naskiĝis en Hiperboreujo. Hera, la edzino de Zeŭso, ĵaluza, postulas, ke Pitono postkuru la gravedan Leto-n por malpermesi, ke ŝi akuŝu. Tamen, post 9 tagoj kaj noktoj da suferoj, Leto alvenas en Delos, kiu bonvole akceptas ŝin ; ĉi tie, ŝi naskas Artemisan kaj Apolonon. Nutrita je nektaro kaj ambrozio, la juna dio rapide grandiĝas. Nur kelkajn tagojn pli poste, kun sagoj kaj arko ĉe mano, li postkuras Pitonon por venĝi sian patrinon. Li alvenas piede de Parnaso ; per sagoj kaj flama torĉo li mortigas la Serpenton. Li proprigas al si la sanktejon, kiun li nomas Delfo. Estas la anstataŭigo de Tera Diino per Suna Dio.

Hera, furioza, postulas, ke Zeŭso altrudu punon al Apolono. Apolono estas devigata, dum kelka tempo, ekziliĝi en Tesalio, kiel paŝtisto ; ĉi tie li estas la protektanto de la brutaroj, la lupoj-mortiganto. La arkaika skulptarto lin montras kun ŝafido sur la brakoj aŭ sur la ŝultroj. Kiam Apolono revenas en Delfon li partigas la sanktejon kun la Diino Tera, kultas Pitonon en la Pitiaj Ludoj, sed forte influas la orakolojn de la Pitio. La historio de Apolono, pli kompleksa, multe interesis la historiistojn.

LA LANDO DE LA HIBERBOREOJ

Laŭ Sofoklo, Hiperboreujo situas « ĉe la limo de la mondo, ĉe la fontoj de la nokto, kie la ĉielo disvolviĝas. ĉe la praa ĝardeno de Febo ». Diodoro de Sicilio faras pri tiu lando pli precizan priskribon, kiu permesas ĝin geografie situi : « La Hiperboreoj loĝas norde de Oceano, fronte de Gallujo, trans la vento Boreo, t.e. tre norde. Tie ankaŭ estas insulo tiel granda, kiel Sicilio. La loĝantoj kredas, ke ĝi estas la naskiĝloko de Leto ; de tio venas, ke la insulanoj speciale kultas Apolon, ŝian filon ; preskaŭ ĉiuj estas pastroj de tiu dio ĉar senĉese ili kantas himnojn je lia honoro. En sia insulo ili konsekris grandan terenon meze de kiu staras belega templo, rondforma, ĉiam plenigita je riĉaj oferdonoj ». Tiu insulo, tiu templo estas la Britaj Insuloj kaj la sanktejo Stonhenge, konstruita ĉirkaŭ je-2 000-l 400 ; sur unu el la monolitoj, unu ponardo kaj du hakiloj micenaj pruvas la rilatojn inter Hiperborujo kaj la greka mondo. Tre antikva tradicio atribuas la kreadon de la Delfa orakolo al la Hiperboreo Olen, dio de la skandinavia mitologio ; (fonetike : Apolono estas Al Olen = veninta el Olen). Diodoro de Sicilio precizigas, ke la kulto de Olen disvastiĝis tra la kelta Gallujo al Sud-Oriento ĝis Palestino. Eĉ, ke Delos, kiu akceptis Leto, estis la centro de tiu suna kulto. Plue Nordo estis la lando de la urso, de la apro, la fidelaj akompanantoj de Artemisa ; ĝi ankaŭ estis la lando de la harpo, de la liro, de la arko, kiujn adoptis Apolono.

Estas inter la 11-a kaj la 6-a jarcentoj, ke Apolono iĝas la vera mastro de Delfo kaj de ĝia orakolo. La tiu*tempaj statuetoj estas bronzaj masklaj figuroj.*

La altaro konsekrita al Apolono estis plurfoje rekonstruita. En la komenco ĝi estis el abelo-vakso kun plumoj ; poste el plektitaj filikoj ; poste el laŭrfolioj. Kaj Hefesto, dio de la fajro, de la metaloj, de la forĝistoj, konstruis altaron el bronzo, kiun tertremoj detruis. De tiam la templo estis multe pli vasta. Tiu priskribita de Herodoto estis ellaborigita helpe de monofero al kiu partoprenis la faraono Amasis, (-526) kiu deziris bonajn rilatojn kun la grekoj. Incendio detruis la templon kaj ĝin rekonstruis la Alkmenidoj, riĉa Ateno-a familio ekzilita en Delfo ; sed denove detruita de ŝtonfalop. Nova monofero, al kiu eĉ la plej malriĉaj alportis sian obolon. Disrabado, tertremoj kondukis al novaj restarigoj. La fustoj de la kolonoj, kiujn ni nune vidas, la fragmentoj de la skulptaĵoj en la muzeo atestas la grandiozecon de tiu templo en vastega dekoro.

(daŭrigota).

LA HORN - KAB - VELŜIPOJ

Estas en 1897 ke la ŝip-posedantoj de Dunkerque, Rouen, La Rochelle, Bordeaux sed precipe Nantes, komencis konstruadon de la grandaj velŝipoj, kies kargo-pezo atingis de 2.500 ĝis 4.500 tunoj (Germanujo kaj Anglujo ankaŭ konstruis tiajn velŝipojn. Je ĉiu el siaj vojaĝoj tiuj ŝipoj preterpasis la faman Horn-Kabon. Tiuj tri-mastuloj, kvar-mastuloj (kaj du 5-mastuloj nomitaj France) kun mastaroj altaj je 45-55 metroj, kun velaroj surfacaj je 2.500-5.000 m2 foriris el Eŭropo kun karbo, cemento, ferajoj, aŭ « ĝenerala kargo », direkte al ĉiuj regionoj de nia globuso. Ili revenis kunportante nitratojn, el Ĉilio, cerealojn el Ameriko aŭ Aŭstralio, lignojn el okcidenta Afriko, lanojn el Novzelando, rizon el Ekstrem-Orienta, sukeron el Antiloj, K.T.P.

La velŝipoj, sen motoro kompreneble, devis kalkuli nur pri la ventoj kaj iliaj kapricoj. Ili laŭiris Nord-Atlantikon, preterpasante, se eble, Madejron (Madère) kaj la Verdkabajn Insulojn transiris ekvatoron je la longitudo 30°, survoje renkontis la frenezajn ventojn kaj pluvojn de « Poto je Nigro » (Pot au Noir), lasis sin konduki de la sudorientaj tradoj. La ŝipoj, kiuj celis Ekstrem-Orienton pasis sufiĉe malproksime de Bon-Espero-Kabo kaj suprenirante Hindian Oceanon, transpasis la markolon de la Sundaj Insuloj por direktiĝi al Ĉinio kaj Japanio. Tiuj, kiuj celis Aŭstralion, atingis la 40-an paralelan cirklon, kie la malantaŭaj ventoj, la plej danĝeraj, ĉiam tempeste blovegis dum semajnoj. Direkte al Ĉilio,



kaj Pacifiko, ili, post laŭlongado de la Sud-Atlantiko, atingis la 35-an paralelan cirklon, kie, en la ĉirkaŭaĵoj de Horn-Kabo, regis ŝanĝantaj ventoj.

La aŭdacaj ŝipestroj enŝoviĝis en la markolon, kiu apartigas Patagonion de la Insulo de la ŝtatoj. La aliaj ĉirkaŭiris la insulon. En la ĉirkaŭaĵoj de Horn-Kabo, la okcidentaj ventoj blovis tempeste 11 monatojn el 12 ; ili levis ondojn, kiuj povis atingi alton 30-metran kaj amplitudon je 300 metroj de unu kresto al la alia. Tial kelkaj velŝipoj ĉi tie boardis dum semajnoj antaŭ ol atingi Pacifikon. La « Montcalm » el Nantes, en direkto al San Francisko, kvankam batalinte dum du monatoj, ne sukcesis transiri la Kabon, takis, kaj laŭ Bon-Espero-Kabo, Sud-Aŭstralio, kaj Pacifiko ĉirkaŭiris la mondon por atingi sian destinon. Fronte al tiuj vetero-furiozoj, la ŝipo estis nenio.

La « pamperoj » de la Brazilaj marbordoj, la tajfunoj de la Ĉiniaj maroj, la ciklonoj de la Hindia Oceano, la ventobategoj de ĉiuj maroj, la glacimontoj de la Antarktaj vastaĵoj, okazigis multajn sinistrojn kaj dramojn : La ŝipanaro de « Babin-Chevaye » apenaŭ evitis glacimonton ; la morgaŭon ili malkovris disrompitaĵojn kaj la buon de Germana kvar-mastulo « Woglinbe » el Hamburgo ; kelkajn tagojn antaŭe, ili ambaŭ najbariĝis en Ĉilia haveno. La tri-mastulo « Psyché » el Bordeaux, sinkis en plen-Atlantiko ; 43 tagojn pli poste norvega velŝipo renkontis boaton en kiu estis mortantaj deko da viroj, kiuj ne plu havis nutraĵon nek dolĉan avon. Ili estis jam mortigintaj unu el ili por lin manĝi kaj intencis murdi la novicon ; kelkajn jarojn pli poste, tiu novico fariĝis kapitano de la tri-mastulo « Bougainville ». Christian Demont el Lorient (kiu heroike batalis en Dixmude-1914) rakontis ke lia trimastulo « Jeanne Guillon » el Nantes, troviĝis antaŭ Horn-Kabo. La maristo Bozec, kun sia marsurtuto kaj siaj botoj, estis forprenita de forta ondo ; oni tuj haltigas la ŝipon, oni almarigas boaton ; de tempo al tempo la ŝipo forĵetas lumigan fuzeon por signali sian pozicion. Dum unu horo, du horoj, oni serĉas Bozec en tiu terura aŭstrala nokto ; al la subŝipestro, kiu estras la barkon, ŝajnas, ke estas io supre de kresto ; li hurlas « ĉu estas vi, Bozec ? ». Trankvila voĉo respondas : « Jes, estas mi, Kial ? » ; pacience, fideme, Bozec, kun la korpo tra la buo, kiun oni estis forĵetinta, atendis siajn savistojn.


Solidaj viroj, la plejmulto estis bretonaj, estis necesaj por konduki tiujn belegajn ŝipojn, purajn kaj brilantajn, kiel nova soldo. Ili ĉiam konsciis la malnovan maran proverbon : « unu mano por la ŝipo, la alia por ci ; sed, se la ŝipo suferas, ci aldonu 3 fingrojn » ; en la danĝeraj momentoj, estis ofte la du manoj, kiujn la viroj donis al la Velaro.

Sur la ŝipo la manovro konstituis la ĉefan kaj la plej penigan el la laboroj. Tuj kiam la vento variis ĉe sia forto kaj sia direkto, tuj necesis orienti la velstangojn, pliigi aŭ malpliigi la

vel-surfacon. La tuta ŝipanaro, kun la oficiroj ĉe kapo, partoprenis la manovron kaj en minimuma tempo efektivigis la ŝanĝon necesan ĉe la ŝnuraro de tiuj tol-katedraloj.

Dum la tempestoj, la bategoj de la ondoj ofte minacis forpreni la virojn, kiuj, kun akvo ĝis ventro ,sub mordo de la malvarmo, de la glacipluvo, de la neĝo, en la mallumo, spertis nehumanan travivaĵon, ĉiam peniga, kelkfoje terura. Sed estis skolo de energio, de persistemo, de maltimo, kie ŝipo kaj ŝipanaro strikte kuniĝis, precipe ĉe horo de danĝero. La malnova frateco de la mar-anoj ĉiam montriĝis : unu por ĉiuj, ĉiuj por unu.

La nutraĵo malmulte variis ; estis nek glaciujoj, nek fridujoj. Antaŭ ol foriri oni enŝipigis freŝajn porvivaĵojn por 4-5 tagoj kaj stokon da terpomoj, kiu daŭris unu aŭ du monatojn. Poste estis fazeoloj : ruĝaj unu tagon, blankaj la morgaŭon ; por venki la plej spitemajn, la ŝipkuiristo aldonis al la kuiro kelkajn sod-kristalojn. Nevario : sala lardo aŭ laberdano, ĉiam strikte porciumitaj. Ne estis pano, sed marbiskvitoj enfermitaj en zink-kotro, interne feltogarnitaj ; kelkfoje, malgraŭ tio, post kelkaj monatoj, ili estis trufitaj je blankaj vermoj. Al tiuj magraj porcioj aldoniĝis la survoje fiŝitaj bonitoj, flugfiŝoj, focenoj ; ili permesis lukti kontraŭ skorbuto, aŭ beriberio, kiuj okazis pro ekceso de peklaĵoj kaj ladmanĝoj.



Je ĉiu manĝo, ĉiu viro ricevis 25 cl. da vino kaj por la vaĉomaristo, ĉiumatene 6 cl. da melasbrando. Ankaŭ la dolĉa akvo estis rigore porciumita. La subŝipestro, kaj eĉ kelkfoje la kapitano, kontrolis la atribuadon de tiu akvo por la kuirado. Oni ankaŭ plenigis malgrandan ujon lokitan sub la okuloj de la vaĉo-oficiro, kaj je kiu oni povus sensoifiĝi dum la tago.

Kaj la akvo-pumpilo estis pendserure ŝlosita ĝis la morgaŭo. Ĉiun dimanĉon, ĉiu viro ricevis proksimume 7 litrojn da dolĉa akvo por lavi sin kaj siajn tukojn kaj vestojn ; sed la viroj sciis ilin lavi en sala akvo dank'al la Panamaligno, kiun ili estis kunportintaj. Kiam oni pasis ĉe « Poto je Nigro », oni kolektis la akvon de ĝiaj diluvaj pluvoj en tolojn pretajn je tiu celo. Bonfara Manao !

Ne estis medicinisto sur la velŝipoj. Kofro entenis medikamentojn la plej necesajn por fronti ĉiujn urĝojn kaj libreton 28-paĝan « dediĉitan al la ŝip-kapitanoj » ; ĝi klarigis kiamaniere flegi negravajn kaj mortigajn malsanojn : ĥolero, frakturoj, skorbuto, paludismo, flava febro, veneraj malsanoj, disenterioj, tuberkulozo. Estas vere, ke la velŝipistoj estis malofte malsanaj. La kamaradoj atentis, ke ne estis laborevituloj. Cetere la maro igis la farton neatakebla ĉe tiuj fortikaj viroj.

La Horn-Kab-ŝipistoj ne havis familian vivon. La Prezidanto de la Horn-Kab-ŝipistoj, Yves Menguy, forpasinta antaŭ kelkaj jaroj, en sia 88-a jaro, deklaris, ke dum 9 jaroj li estris la trimastulon « Vincennes » el Nantes sen unu ripoztago. Entute dum 27 deĵoraj jaroj li pasis 8 monatojn en sia hejmo, kio estas 9 tagoj jare.

Sed kiaj viraj ĝojoj !

La ŝiphaltejoj :

Kompreneble la Horn-Kab-ŝipistoj ne estis pastroservantoj ! Post 2-3-4-5-6 monatoj da malfacilaj travivaĵoj, oni kelkfoje rigardis ilin, ĉe la haltejoj, kiel frenezulojn. Ili loĝis en tute specialaj hoteloj ; ili vizitis prostituejojn el kiuj eliris la kriaĉaj rekantaĵoj de la mekanikaj pianoj, rekantaĵoj tarifitaj unu soldon.

En la Pacifiko-havenoj ekzistis vera gangsteraro ; tiuj gangsteroj havigis virojn al la Amerikaj balenbarkoj ; pro tio ili alkroĉis mariston, lin ebriigis, pere de narkotaĵo se montriĝis necese. La morgaŭon la « dezertinto » vekiĝis sur nekonata ŝipo. Dume la gangsteraro vendis viron al la velŝipo por anstataŭigi la dezertinton. La profito estis duobla.

Multaj estas la velŝipoj kiuj perdiĝis kun « korpoj kaj havaĵoj » pro ŝippereoj aŭ incendioj. Aliaj estis torpeditaj dum la unua mondmilito.

Sed estas precipe la fosado de la Panamaistmo kaj la apero de motorŝipoj, kiuj malaperigis la belajn Horn-Kab-velŝipojn.

VENTMUELILOJ KAJ VENTMUELEJOJ EN LA MONDO

En Portugalio, la ventorado konsistas el 4 tiaj veloj etenditaj per sistemo de 8 stangoj kaj multaj stajoj. En Grekujo, la ventmueliloj havas 8, 10, eĉ 12 brakojn kaj tiom da tolaj veloj triangulaj. Kompreneble, en tiuj du lastaj landoj, la muelisto pli-malpli disvolvas la velojn laŭ la forto de la vento.

Ek de la jaro 1840 aperis en Parizo kaj en kelkaj provincoj de Francujo (Aunis, Saintonge, Poitou, Beauce) la t.n. « **Sistemo BERTON** » : ĉiu alo konsistas el 11 longaj **paralelaj tabuloj el ligno,** kiuj povas formi pli-malpli larĝan surfacon, ĉar la muelisto povas, ek de la interno de la muelejo, per simpla mekanismo, pli-malpli fermi la alon, superigante ĉiujn tabulojn unujn super la aliajn ĝis la larĝeco de nur unu tabulo, aŭ malfermi, t.e. plilarĝigi ĝin, laŭvole, per la mala movo.

En Britujo kaj en kelkaj freŝdate restaŭritaj muelejoj de Nederlando, la 4 aloj konsistas el **ĵaluzioj,** kompreneble reguleblaj laŭ la forto de la vento.

La interna mekanismo de la muelejo

Se ni eniras en la muelejon, ni povas trovi tre diversajn mekanismojn, ĉar ne ĉiuj mueliloj muelas. Se la plimulto da ili muelas grenon aŭ aliajn grajnojn, estas multaj aliaj, kiuj faras tre diversajn laborojn : oni uzis ilin por elpremi oleon, pumpi la akvon de la polderoj aŭ la maran akvon en la salejoj, fabriki paperon, tabakon, ĉokoladon, cementon, tanilon, por dispremi nuksojn aŭ fabojn, dragi ŝlimon aŭ sablon en la havenoj, poluri marmoron, segi lignon, k.t.p.... Kaj ĉiu faka laboro necesigas specialan mekanismon.

Ni nur parolu pri vera muelilo, t.e. maŝino, kiu muelas grenon por fari farunon. Plej ofte, kuŝas en la muelejo nur unu **paro da rondaj muelŝtonoj** horizontalaj, unu senmova, la « **kuŝanta muelŝtono** », super kiu turniĝas la alia, la « **kuranta muelŝtono** ». Ĉi tie, ni jam admiru la grandan precizecon de la mekanismo : la supra muelŝtono, kiu ofte pezas unu tunon aŭ pli, turniĝas je malpli ol unu milimetro super la alia, neniam tuŝante ĝin. Tio necesigas perfektan vertikalecon de la akso, kiu movas la kurantan muelŝtonon, kaj la perfektan horizontalecon de ambaŭ muelŝtonoj.

Ni nun supreniru ĝis la supra parto de la konstruaĵo. Jen estas la mekanismo, kiu funkciigas la muelilon. Super nia kapo kuŝas horizontale (aŭ iomete klina de antaŭe malantaŭen) la dika akso de la aloj, **la aloŝafto,** sur kiu estas fiksita la tre granda ligna dentorado nomata **la ŝpinrado,** aŭ **granda ŝpinrado.** Tiu granda ligna rado endentiĝas kun la stangetoj de ia vertikala bobeno, la t.n. **lanterno,** fiksita sur la fera akso de la kuranta muelŝtono, **la vertikala ŝafto.** Ĉar la dentoj de la ŝpinrado estas pli multaj ol la stangetoj de la lanterno, la kuranta muelŝtono turniĝas pli rapide ol la vent-rado, t.e. ol la aloj.

Tia estas, **maldetale,** la ĉefaj eroj de tiu granda maŝino, kia estas ventmuelilo. Sed, kompreneble, multaj aliaj elementoj konsistigas la mekanismon : **la bremso** por haltigi la muelilon, **la muelregulilo** por reguligi la turniĝon de la muelŝtono, **la grenfunelo** por ŝuti la grenon al la muelŝtonoj, **la vibranta ŝuttrogo** por reguligi la falon de la greno, **la farunkondukilo** por gvidi la farunon al la sako, **la kriblilo,** kelkfoje **la sakhisilo,** k.t.p....

Resume, **muelilo estas maŝino,** maŝino kiu grave rolis kaj ankoraŭ grave rolas en kelkaj landoj. Sed tiu rolo estas tre malsimila de tiu de multaj maŝinoj, ĉar ĝia rilato kun la homa vivo estas malsimila :

Unue, dum ofte la apero de la maŝinoj estis malfacile, eĉ kolere akceptata de la homoj, ĉar la permanaj laboristoj timis, ke la novaj maŝinoj senigos ilin de ilia laboro — ekz. la teksmaŝinoj, — kontraŭe ŝajnas, ke la mueliloj estis tuj tre favore akceptataj de la homoj, ĉar oni tuj vidis en ili bonfarajn helpantojn, kiuj senigas la laboristojn ne de ilia perlaboro, sed de ilia laciĝo.

Due, dum la laboristo, kiu daŭre laboradus per la sama maŝino en uzino laŭ la nunaj laborĉenoj, ne povas ŝati sian senvarian laboron, kiu novmaniere sklavigas lin, kontraŭe **la muelisto vere amas sian muelilon.** Ĉiuj turistoj, kiuj vizitis ventmuelejon kaj povis konversacii kun la muelisto, ĉiam konstatis tiun amon de la homo por la muelilo ; kaj se la muelilo difektiĝas, precipe se ĝi ne plu funkcias kaj iom post iom ruiniĝas, la estinta muelisto ĉagreniĝas ; li nur iom ĝojas, se venas al li vizitanto, al kiu li povas rakonti pri sia estinta laboro kaj sia muelilo. Kial ? Ĉar la muelisto loĝas en aŭ tuj apud sia muelejo, vivas kune kun la muelilo ; lia vivoritmo rilatas al la ritmo mem de la muelilo ? Dum sia laborvivo, la muelisto eĉ paroligas sian muelejon, ĉar, en ĉiu lando, eĉ regiono, estas propra **lingvaĵo de la muelejoj** : naskiĝo, festo, ripozo, morto en la familio de la muelisto tuj estas anoncataj per la grandaj aloj de la ventmuelejo, kiuj haltis lau interkonsentita maniero.

Do, muelilo ne estas banala maŝino : en la muelejo, homo kaj maŝino tiel profunde kuniĝis en la ĉiutaga laboro, ke ambaŭ estas kvazaŭ intima paro.

Krome, se temas pri ventmuelejoj, la konstruaĵo, en kiu funkcias la muelilo, plej ofte estas belaspekta, kaj vivigas la pejzaĝon per la ĝoja tiktako de sia mekanismo kaj la larĝa turniĝo de siaj grandaj aloj.

Tamen, iom post iom ruiniĝas kaj malaperas la ventmuelejoj en preskaŭ ĉiuj landoj. Je la fino de la pasinta jarcento, miloj da ventmueliloj funkciis en Francujo, Belgujo, Nederlando, Britujo, Germanujo, Hispanujo, Portugalujo, Rusujo kaj ĉiuj Skandinaviaj landoj. Nuntempe, nur kelkaj centoj ankoraŭ laboras kaj ornamas la pejzaĝojn.

Sed ne ĉiuj malaperos. Pli kaj pli multaj estas la homoj, kiuj interesiĝas pri la akvomuelejoj kaj ventmuelejoj ; kaj tiuj muelejamikoj ariĝas en landaj kaj interlandaj asocioj, por savi, por restaŭri la plej belajn muelejojn, aŭ por rekonstrui ilin en subĉielaj muzeoj en Britujo, Belgujo, Danujo, Finlando, Francujo, Germanujo, Nederlando, Rumanujo, Svedujo, eble aliloke. — Jam trifoje okazis internaciaj simpoziumoj (t.e. **kongresoj) de Muelilologio,** en kiuj partoprenis multaj fakuloj kaj muelejamikoj. La unua okazis en Danujo en 1963, la dua en Portugalujo en 1965, la tria en Nederlando en 1973. Krome, oni multe studis kaj skribis pri la muelejoj, kaj ankoraŭ multe skribas. Pasintjare, S-ro Claude RIVALS, fakultatasistanto en TOULOUSE, verkis, post longa serĉado kaj pluraj vojaĝoj, imponan kaj grandvaloran tezon pri tiu temo.

Do ni esperu, ke ne ĉiuj ventmuelejoj malaperos. Jam multain oni restaŭris, jam pluraj denove funkcias kiel energifontoj. Mi ĝoje salutas la revivon de la ventmuelejoj.

Louis Chasseriaud.

La tekniko kontraŭ la individuo


La sciencaj progresoj kaj iliaj teknikaj aplikaĵoj (precipe elektroniko, transistoro, komputero kaj etigado de la aparatoj) alportis al la homo konsiderindajn avantaĝojn ; lia vivmaniero pliboniĝis ; li konas sin pli bone kaj li konas pli bone la universon, kiu ĉirkaŭas lin. Sed, se tiuj sciencaj malkovroj malfermas vastajn perspektivojn al la ekonomia, sociala, kaj kultura vivo, aliflanke la biologio, la medicino kaj la biokemio minacas la homan korpon kaj ankaŭ la individuon en lia privata vivo.

La muroj havas elektronikajn orelojn

La unua novigaĵo, estas, en 1941, la telefona « aŭskulta tablo ». Estas induktobobeno lokita ĉe la telefono-drato kaj ligita al receptilo por aŭdado kaj registrado de la konversacioj. Sed oni perfektigis tiun bobenon ; ĝi povas esti transportata en poŝo kaj esti ligita al eteta magnetofono ; ĝi povas registri la konversaciojn, kiuj okazas en apuda hotel-ĉambro aŭ en atendejo de aferisto, advokato aŭ ŝtatoficisto ; aŭ eĉ de sur strato, kiam la telefono ne tro malproksimas la trotuaron. Novaj teknikoj permesas identigi la telefonparolantojn. Oni ankaŭ uzas la mikrofonon ligitan per drato al laŭtparolilo, lokitan ekster la ĉambro aŭ al magnetofono, kiu ekfunkcias aŭtomate per la voĉ-sono, kaj kiu povas funkcii dum pluraj horoj. Ekzistas mikrofonoj ultraetigitaj, larĝaj kiel alumet-kapo, kiujn oni povas meti internen de telefono, de florpoto, de bildkadro, ofte sub meblo. La mikrofonoj kun frekvenco-modulilo havas sian propran dissendilon ; ili funkcias per pilo (40-grama pilo povas funkcii seninterrompe dum 5 tagoj). Ekzistas tre malgrandaj mikrofonoj (ĉirkaŭ 5 gr.), kiujn oni povas kaŝi sub jakorefaldo (ĝia kapo kiu aperas ĉe la butontruo havas 9 milimetran diametron), en manuma butono aŭ en fontoplumo ; ili estas ligitaj al poŝa magnetofono aŭ al etigita dissendilo. Kelkaj direktantaj mikrofonoj povas esti uzataj malproksime de la konversaciejo, tra malfermita fenestro, sur publika benko aŭ en libera aero kaj je pli ol cent metroj ; eĉ tra fermita fenestro je distanco 40-50 metra.

Ankaŭ la kontakto-mikrofono evitigas eniri en la lokojn, kie oni parolas ; tiu aparato povas esti ne pli dika ol fabo ; oni povas ĝin filksi ĉe muro de ĉambro, ekstere ; la sonoraj ondoj de la parolo, kiuj frapas la muron estas fidele registrataj ; kiam la muro estas dika oni uzas nadlomikrofonon. Oni povas ankaŭ uzi reflektilon (maldika membrano kun anteno) ; la aparato funkcias dank'al hiperfrekvencoj, kiuj trairas la murojn eĉ tra bloko da domoj.

Estas ankaŭ mikrofono-kuglo, kiun oni forĵetas per speciala fusilo tra fenestro. Fine estas ankaŭ la lasermikrofono ; tiu translokebla aparato elsendas infraruĝan faskon, do nevideblan, kiu povas trairi plurajn kilometrojn ĝis la celita ĉambro, permesas, post amplifiko kaj analizo, restarigi la sonojn kaj la parolojn. Dentisto povas, plombante denton, enigi en ĝin etetan mikrofonon kapablan transdoni ĉiujn prononcatajn parolojn, aŭ etetan dissendilon, kies sona signalo permesas al observanto sekvi ĉiujn translokiĝojn de la observato Alia eteta dissendilo povas esti glutata, sen la scio de la glutanto ; ili ankaŭ kapablas transdoni ĉiujn reagojn de la korpo (pulso, korobatojn, arterio-premo). Tiaj aparatetoj, lokitaj en aŭtomobilo,



permesas ĝin sekvi eĉ de kelkaj kilometroj malproksime. Ili permesas ankaŭ detekti la TV-ĉenon uzatan en loĝejo.

Nevideblaj okuloj, kiuj ĉion vidas

Optikaj aranĝoj permesas rektan observadon aŭ registradon de la bildoj ; rektan observadon permesas etetaj luketoj lokitaj en muro, polaroidaj vitroseptoj, aliaj selektivaj speguloj kaj teleskopaj lornoj. Fotografiloj aŭ kinematografoj etetigitaj povas registri la bildojn ; ili funkcias aŭtomate je regulaj intervaloj aŭ pro malfermo de tirkesto aŭ pro eniro de iu en la ĉambron. Teleobjektivo longa je 20 cm. povas foti tajpitan paĝon je distanco 100 metra. La lumo densigiloj por rekta observado aŭ bildo-registrado donas normalan vidadon en krepusko aŭ lun-lumo ; kaj sufiĉan vidadon en senluna nokto. La bildo-stabiligiloj firmigas la precizecon de la fotoj faritaj el helikontoj aŭ de persono, kiu translokiĝas. Helpe de malgrandaj dissendiloj (7 × 22 cm.) la televidaparatoj observas kaj

registras la bildojn. Optikaj fibroj muntitaj malantaŭ la objektivo permesas ne rektalinian iron de la lumaj radioj ; sekve la objektivo povas esti en la observata ĉambro kaj la kamero aliloke ; kelkaj kameroj, kies objektivo estas granda kiel cigaredo povas esti en poŝo. Uzado de infraruĝaj radioj permesas observadon kaj registradon en obskureco ; oni povas loki sur alta meblo specialan ampolon, kiu disradias la transruĝajn radiojn, por nudokulo nevideblajn ; specialaj filmoj prenas en obskureco bonkvalitajn fotojn ; fenestro sen kurtenoj kaj sen ŝutroj permesas foti el ekstero ; pli speciala tegaĵo sur opaka muro tralasas la transruĝajn radiojn. Per fasko de infraruĝoi oni povas foti la internon de sigelgluita koverto ; oni povas enigi en tiun koverton elektran torĉon ne pli grandan ol kudrilo por prilumi la enaĵon ; specialistoj rapide legas la literojn eĉ inversitajn kaj kiuj parte kovriĝas.

Optikaj aparatoj fotas hore 840 tajpitajn paĝojn ; ili ankaŭ permesas la aŭtomatan observadon de la leteroj ricevitaj de iu kaj registras la nomon kaj la adreson de la senditoj ; eĉ komputero povas registri kaj analizi la tuton. Sen la scio de iu, oni povas ŝmiri liajn manojn, ŝuojn, vestojn kaj harojn per kolorigaj pulvoroj aŭ fosforeskaj substancoj, nevideblaj sub natura lumo, ili eligas lumeton sub lampo kun ultraviolaj radioj, kiun la sekvanto tenas en mano.

Kelkaj flugantaj aparatoj havas aŭskultilojn kaj televidajn kamerojn ; inter 30 kaj 600 metra alteco, ili, restante senmovaj, povas foti ĉion, kio okazas, ĉiudirekte, je pli ol 1 500 metroj. Preskaŭ ĉiuj movantaj objektoj kaj la korpoj kun varma sango (homoj kaj bestoj) eligas varmon, kiun oni povas detekti ; kelkaj aparatoj estas tiel sentivaj, ke ili povas registri diferencon je 1/1 000 da gradoj C ; oni povas detekti sur kiu sidilo persono ĵus sidis ĉar ĝi konservas lian varmon dum kelkaj minutoj.

Tiu optika kaj aŭskulta observado estas utila en multaj okazoj ; la magnetofono registras muzikon, prelegojn, tajpotajn leterojn ; ili aperigas ĉeeston de termitoj en lignaj traboj aŭ feblajn punktojn de metala konstruaĵo ; la televido permesas sekvi samtempe kursojn en diversaj klasejoj ; kaj kontroli magazenojn, laborejojn, lernejojn, staplojn — nokte kaj tage ; ankaŭ observi operaciitojn kaj mens-malsanulojn.

Malfeliĉe tiuj sensaciaj aparatoj estas ankaŭ en la manoj de gangsteroj kaj krimuloj.

Mensa esplorado

La lastaj jardekoj precizigis teknikojn, kiuj permesas testi la individuojn — fizike kaj morale ; tiuj testoj, medicine, celas plibonigi ilian sanstaton. La personecaj testoj (psikaj demandaroj kaj ankaŭ la mensogo-detektilo kaj la narkota analizo) utilas en lernejaj kaj profesiaj orientadoj. Tamen povas okazi eraroj, nevolaj aŭ pro la nekompetenteco de la testisto, kiuj povas longe pezi sur la testita persono. La korpaj ekzamenoj, la detalaj demandaroj povas igi, ke la testito — propravole aŭ ne — liveras siajn inklinojn politikajn aŭ religiajn, siajn rilatojn seksajn aŭ familiajn, siajn plej intimajn pensojn. Tiaj enketoj lasas impreson de ĝeno kaj malsekureco. La mensogo-detektilo ne plu bezonas elektran draton ; kaŝita en seĝo ĝi aperigas ĉiujn reagojn de la observato (pulso, arteria premo, kuntiriĝo aŭ dilato de la pupiloj, ŝanĝiĝo de la voĉo).

La komputero

Estas probable, ke, en la 20 venontaj jaroj, ĉiaj informoj estos komputeritaj. La duono de la telefonaj interkomunikadoj okazos inter komputeroj. Ili estas pli efikaj, malpli kostaj, kaj malpli embarasantaj ol ĉia ajn klasifika rimedo (libroj, dosieroj). Alumet-skatolo povas enteni ĉiujn informojn, kiuj, presitaj, plenigus katedralon. En laser-komputero 20 tajpitaj paĝoj de sciigoj pri ĉiu viro, ĉiu virino, ĉiu infano de la mondo okupus 10 rubandojn larĝajn je 2,5 cm. kaj longajn je 1 500 m. La uzado de la komputero povas nur ampleksiĝi kaj ĉiu el ni havos en ĝi sian dosieron pli kaj pli kompletan : atestoj pri naskiĝo, edziĝo, morto ; dosieroj medicinaj, militaj, profesiaj ; asekuro-kontraktoj, fiskaj deklaroj, pasportoj, registrado de la veturiloj, ŝparkaso, banko-kontoj, bienaj proprietaĵoj, telefona librotenado, vojaĝoj, hoteloj, kredito-kartoj, restadejoj, akcidentoj, amikoj, korespondaĵoj, dogantrairoj, ĉiaj permeso-petoj K.T.P.

Tiuj sciigoj estas ofte propravole donitaj de la personoj mem aŭ de iliaj proksimuloj ; sed povas ekzisti sekretaj informoj kolektitaj de la polico aŭ de la informoservoj.

Fakte tiuj dosieroj ne estas tute sekretaj ; kiu ajn povas alproksimiĝi al la komputero, povas ilin ekzameni kaj esprimi juĝon pri la koncernata persono ; juĝo vera aŭ falsa, laŭ ke la donitaĵoj estas pli malpli ekzaktaj aŭ eksvalidiĝintaj ; tiuj eraroj povas esti nevolaj aŭ akcidentaj pro perturbo ĉe la komputero aŭ rezulto de malbonvolo ; estas facile malaperigi unu informon kaj ĝin anstataŭigi per alia. Tiu manovro estas ne videbla.

Amerikaj entreprenoj komputeris dosierojn pri pli ol 3 milionoj da nacianoj, dosierojn kiuj povas esti venditaj al plej bona paganto. La problemo estas grava ; oni klopodas starigi profesian kodon por la programantoj, cele al sekretigado de la dosieroj, kontrolado de la eraroj fare de la interesatoj, protektado de la privata vivo ; jam oni kreis « ŝlosilojn », pasvortojn, kiuj kontrolas la aliron al la komputero.

El Courrier de l'UNESKO.



Ferenc Dalméth

LA FIŜKAPTISTO KAJ LA SPIRITO

Vivis foje en la urbo Bagdad iu viro nomita Hassan. Kiu ne havante ion lernitan profesion akiris sian ĉiutagan panon per iaspeca skribaĉajo. — Unue vere nur malfacile estis lia vivovojo, sed poste, kiam li jam divenis, ke glorkanti pri la beleco de la hurioj, kaj pri la barbo de la profeto, jam ne akiras honorarion, x/ li komencis sufiĉe elpensadi poemetojn vekantajn rideton, kaj komencis sufiĉe bone mongajni. x/ pro la ĉiam pli granda konkurenco. Li prikantis, ke en la bazaro oni vendas rancan turkan mielon aŭ pretigis mokajn strofojn pri la turbanoj plejnovmodaj. Tiamaniere li sukcesis dum kelkaj jaroj tiom kunŝpari, ke li povis aĉeti por si du kaprojn kaj unu edzinon. Liajn verkojn ĝenerale karakterizis la griza pripensado. Liaj skribaĵoj estis nek tro malvarmaj, nek tro varmaj. Li ĉiam zorgis pri tio, ke kaj la brasiko satiĝu kaj la kaproj provu resti (1).

Nu, sed tiu certa Hassan eĉ en la tagoj de la feliĉa abundo ne forgesis sian iaman, dorlotatan pasion aŭ hobion : Se li nur havis okazon, li promenis al la bordo de la rivereto apud la urbo kaj fiŝkaptadis. Kaj kiam foje foje perko kompatis lian altuziasman klopodadon kaj memvole saltis en lian reton, li sentis, kvazaŭ li ne mal ŝparus vane sian tempon sur la tero. Sed hodiaŭ li ne havis feliĉon. Unue li kaptis likhavan poton poste eluzitan sandalon. Sed la suntelero jam minace proksimiĝis al la kupolo de la palaco de la kalifo kaj el la malproksimo la voĉon de la muesino alportis la vento de la malfrua posttagmezo.

Li decidis, ke li faros ankoraŭ unu provon, sed tiu estos la lasta ! — Ne daŭris eĉ kvin minutojn kiam li sentis, ke io komencas tiri la ŝnuron. Li fulmrapide ektiris la reton, sed la predo estis je lia plej granda seniluziiĝo nur iu tre suspekta botelo. — Ne faru — Kio povas esti en ĝi ? — li pripensadis duonlaŭte. Sed ĉar la botelo ne pezis multon, li decidis, ke li ne okupiĝos pri la forigo de la rustiĝinta lad-korko kaj reĵetos la tutan botelon en la akvon.

Li jam levis sian dekstran manon kiam ne atendite eksonis iu voĉo el la interno de la botelo. — Ne faru ion senpripense, brava Hassan « Mi opinias ke mi eĉ malgraŭ mia griza eksteraĵo povas esti utila kunhelpanta kamarado en via laboro, ĉar mi konas tre multajn mirindajn rakontojn kaj ke vi vidu, ke mi ne volas trompi vin, mi nun tuj rakontas unun al vi el ili. Hassan iom surpriziĝis pri la nekutima aperaĵo, sed ĉar li jam en siaj junaj lernej-jaroj legis la plenan eldonon de la Mil kaj Unu Noktoj, li tuj sciis, ke ĉi tie li renkontiĝis kun iu spirito kaj li ankaŭ pri tio estis certa, ke tian aventuron oni ne povas travivi sen aŭskultado de iu historio. Li do submetis sin al sia sorto kaj kapjesis, kiam la spirito tuj komencis rakonti.

Sed la sprite komencita agado jam en la unuaj minutoj katenis lian interesiĝon kaj poste, kiom ajn li deziris konservi sian trankvilon ĉe la gajaj turniĝoj de la fabelo li nevole laŭte ekridegis. — Kaj poste, kiam el post la amuzaj konfuzoj li ekkonis la profundan, veran direndaĵon, tiu propra grandioza sento, komparebla kun nenio alia, dominis tute lian estaĵon, — sento, apud kiu naniĝas plezuroj de la amevo kaj de la riĉeco. Ho, kie estas liaj stultaj kantaĉoj de tiu majstra rakonto ? Kvazaŭ sorcite li jam strekis sian manon al sia bambua-poŝo, ke li ekprenu siajn skribilojn kaj nun, tuj ĉe la pala duonlumo eternigu sur papero la tutan...

Sed tiu moviĝo, malligante la rigidecon samtempe rekonsciiĝis kaj resobrigis Hassan. Sur la mirakla tapiŝo de la zorgotimo li pli rapide, ol la vento, reflugis el la mondo de la revoj en la trankvilan realon. — Bone, bela estas la rakonto, sed kion diros pri ĝi la aliaj ? Eble ili miskomprenos ĝin aŭ — dio gardu min, — eble eĉ ili ofendiĝos pro ĝi.

Ne tion li tion tute ne bezonas. Li jam perdis sian emon al la tuta afero. Tiam estos pli bone, se li skribos tiun poemeton, pri kio li jam pensis matene, kiam Omar ekglitis sur ŝelo de oranĝo, ĉar la oranĝvendistoj ne balaas for kaj regule la defalaĝon. Li ja bone vivis ankaŭ ĝis nun sen iu spirito kaj li ankaŭ, estonte bone vivos sen tio. Kaj per granda svingo li reĵetis la botelon en la ondojn.

(Tradukis Paŭlo Balkanyi).

---

(1) Hungara proverbo estas pri tio, ke la saĝa homo tiel aranĝas sian aferon, ke « ankaŭ la kapro satiĝu kaj ankaŭ la brasiko estu konservata ». Ĉi tie la humoristo uzas renversite tiun ĉi konatan esprimon.

KLARIGINDA LETERO

Skeĉo de BUKAR

Dekoracio : Benko en parko.
Roluloj :

PETRO — Junulo, preferinde kun okulvitroj ; aspektas studema ; malaplomba apud virinoj.
SOFIA — Belega fraŭlino surhavanta senmanikan, tre dekoltitan robon ; komencantino en Esperanto.

(PETRO sidas sur la benko kaj legas libron ; SOFIA, tre seksema, alproksimiĝas al li ; ŝi tenas leteron en la mano).
SOFIA — Bonan tagon, sinjoro !
PETRO — Bonan tagon, fraŭlino !
SOFIA (hezite kaj malrapide, kiel persono, kiu ankoraŭ ne tre bone regas Esperanton) — Pardonu al mi, sinjoro, ĉu vi bone scias Esperanton ?
PETRO (tre flue) — Nu, mi kredas, ke jes, fraŭlino. Mi komencis lerni Esperanton antaŭ kvar jaroj, kaj jam vizitis plurajn kongresojn.
SOFIA (sidiĝas apud li) — Vi parolas tre bone ; mi parolas malbone ; mi ne finis la unua kurso.
PETRO — La unuan kurson ; vi ne finis la unuan kurson.
SOFIA (zorge ripetas) — Mi ne finis la unuan kurson. Mi faras multaj... multan... multajn erarojn.
PETRO — Ĉiam estas tia en la komenco. Sed ne malesperu : daŭrigu la lernadon, kaj baldaŭ vi bonege parolos.
SOFIA — Mi esperas...
Sinjoro, ĉu vi volas helpi al mi ?
PETRO — Jes, volonte.
SOFIA (montras la leteron) — Mi ricevis leteron de angla amiko ; mi ne bone...
PETRO — Vi ne bone komprenas ĝin.
SOFIA — Ne.
PETRO — Kaj vi deziras, ke mi klarigu al vi, kion vi ne komprenas.
SOFIA — Jes.
(PETRO fermas sian libron kaj etendas la manon ; SOFIA donas la leteron al li).
PETRO — Ĉu vi estas francino ?
SOFIA — Ne, mi estas grekino.
PETRO — Mi estas dano ; mi nomiĝas Petro ; kaj vi ?
SOFIA — Mi... Sofia.
(paŭzeto ; SOFIA ridetas ; PETRO ŝajnas embarasita ; li mallevas la okulojn al la letero).
PETRO — Do ! La letero... (legas) « Mia kara anasido ».
SOFIA — Kio estas 'anasido' ?
PETRO — Ido de anaso ; anaso estas birdo, kiu naĝas en la akvo, kaj krias : « kojn ! kojn ! ».
SOFIA — Ha ! Sed mi ne estas anasido !
PETRO — Ne ; tio estas karesa nomo... kiel panjo anstataŭ patrino.
SOFIA — Ha !
PETRO — « Eĉ se mi vivus cent jarojn, mi neniam forgesus la vesperon, kiam vi konsentis eniri en mian ĉambron (li ŝvitas, maltrankviliĝas) ; vi senvestigis vin ».
SOFIA — Kio estas 'senvestigis' ?
PETRO — Tiu vorto venas de vesto.
SOFIA — Ves-to... ĉu tio ? (ŝi tuŝas sian robon).
PETRO — Jes ; vesto ; senvesta ; senvestigi sin : demeti la veston, por esti senvesta ; nuda.
SOFIA — Jes... (ŝi ridetas) Mi memoras !
PETRO — « En la malhela lumo de la luno, kiu brilis trans la fenestro, vi montris al mi vian nudan korpon ».
(SOFIA ekstaze rigardas la ĉielon).
PETRO — « ... mi karesis vian haŭton ».
SOFIA — Kio estas 'karesis vian haŭton' ?
PETRO — Karesi la haŭton estas... (li maltrankviliĝas). La haŭto estas la... la... ĉirkaŭ la korpo...
SOFIA — La vesto !
PETRO — Ne, sub la vesto.
SOFIA — Montru al mi ; mi ne komprenas.
PETRO (karesas ŝian brakon) — Mi karesas la haŭton de via brako.
SOFIA — Ha ! Vi karesas la haŭton... de mia brako... (ŝi ridetas, revadas).
PETRO — « Miaj fingroj premis viajn mamojn ».
SOFIA — Ma-nojn.
PETRO — Ne ; li skribis : mamojn.
SOFIA — Ĉu ne estas same ?
PETRO — Ne.
SOFIA — Kio estas mamoj ?
PETRO — Nu... virinoj havas mamojn ; viroj ne havas mamojn. Mamoj estas... ĉe la brusto de virinoj.
SOFIA — Ha ! ĉu tio ? (en siaj du manoj ŝi alprenas siajn mamojn).
PETRO — Jes, tio. « Kaj subite vi arde kaj flame kisis min ».
SOFIA — Kio estas 'vi arde kaj... (ŝi rigardas la leteron) kaj flame kisis min' ?
PETRO — Nu... kisi estas... per la buŝo...
SOFIA — Ho ! Kiel mangi.
PETRO — Ne ; per la lipoj.
SOFIA — Li-poj... Kio estas 'lipoj' ?
PETRO — Lipoj... Tio ! (li montras siajn lipojn).
SOFIA — Ha ! (ŝi tuŝas siajn lipojn) Li-poj. Sed kio estas 'kisi' ?
PETRO — Kisi... estas...
SOFIA — Montru al mi !
(PETRO hezitas, finfine malaplombe kisetas ŝin sur la vango).
SOFIA — Ha ! Ki-si, kisi... Sed... (ŝi rigardas la letron) 'arde kaj flame' ?
PETRO — Kisi... tre forte.
SOFIA — Ho ! Mi memoras ! (ŝi arde kaj flame kisas PETRON) ĉu tiel ?
PETRO — Je... es ! (li reordigas sian kravaton).
« Tiam mi komprenis, ke vi estas la virino de mia vivo. Mi brakumis vin ».
SOFIA — Kio estas 'brakumis' ?
PETRO — Brak- (li singultas) umi estas... estas...
SOFIA — Montru al mi ! Mi pli bone komprenas, kiam vi montras al mi.
(PETRO hezitas, kaj brakumas ŝin).
SOFIA — Ha ! Brakumi...
PETRO — (malprenas ŝin) — « Mi ŝlosis la pordon de la ĉambro ».
SOFIA — Kio estas 'ŝlosis' ?
PETRO — Kiam oni fermas pordon per seruro, oni ŝlosas la pordon ; ĉu vi komprenas ?
SOFIA — Ne ; kio estas 'seruro' ?
PETRO — Seruro estas... estas...
SOFIA — Sinjoro, ĉu estas seruro sur la pordo de via ĉambro ?
PETRO — Jes... (li subite ekscitiĝas) JES ! JES ! (li stariĝas, prenas ŝian manon kaj tiras ŝin) Venu, fraŭlino, venu al mia ĉambro, mi montros al vi !
SOFIA — (stariĝas kaj sekvas lin) — Jes, mi pli bone komprenas, kiam vi montras al mi ! (al la publiko) Estas alia internacia lingvo pli facila ol Esperanto ! (ambaŭ eliras).

FINO

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Kiom da gajnintoj ?

21, ĉar tiuj, kiuj trovis kvar bonajn parojn, ankaŭ trovis la kvinan.

Vorto-ĉeno


Unu solvo por tiu problemo estas :
emo, temo, metio, merito, termino, minareto, marioneto, renomita, materio, ermito, metro, tero, tro.
Eble ekzistas aliajn solvoj. Ni publikigos la aliajn solvojn kiujn sendos niajn legantoj.

Kaŝita proverbo

La konstrueblaj vortoj estas :
Aspekti, grenado, fripono, borakso, turkiso, faringo, danĝera, denunci, trikoto, serajlo, sinjoro, trafiko, dekolti, degradi, tursito, ŝanĝema, sekundo.
Kaj la proverbo estas : enpakiĝu kaj foriĝu !

NOVA PROBLEMO

Krucvortoj



(SF) = vorto sen Finaĵo

Horizontale

1. Arto konstrui maŝinojn — Persono kiu estas ligita kun alia per reciproka inklino *(SF)*.
2. Rizbrando — Ekscese amasigi ion.
3. Farataj en malmulte da tempo — Arabdevena maŝino por suprenlevi akvon.
4. Supernatura estaĵo el skandinavia mitologio *(SF)* — Suferigi iun pro lia kulpo — Numeralo.
5. Nedifina pronomo — Kalia kaj stibia tartrato, uzata kiel vomiga drogo — Dekdua litero de la greka alfabeto.
6. Granda komerca kunveno — Arboj koniferaj.
7. Produktaĵo de kokino aŭ de testudino — Malgranda *(SF)* — Tubeto lutita al la fino de tubo por reguligi la elfluon de likvaĵo tra ĝi *(SF)*.
8. Adverbo uzata por altiri la rigardon sur iun aŭ ion — Juglando *(SF)* — Malgranda ujo por enteni iajn aĵojn *(SF)*.
9. Doni al io ĝian koloron — Tre malagrabla korpa impreso *(SF)*.
10. Nigra kaj blanka birdo el Korvoj — Manĝa kaj trinka diboĉo *(SF)* — Ekstrema flanko de konstruo.
11. Prefikso montranta ripeton — Ilia sumo indikas vian aĝon ! — Komenco de blindeco !
12. Plena malsukceco *(SF)* — Rilata al la steloj.
13. Diverspaĝa skribaĵo kiu sciigas aŭ klarigas pri iaj okazaĵoj — Mallonga literatura verko, en kiu la aŭtoro ne intencas funde pritrakti sian temon *(SF)*.

Vertikale

1. Homoj, kiuj suferis morton pro religia aŭ politika kredo — Sendi kuglojn.
2. Malkorektaĵo — Ĉesigi ies dormon — Viriniga sufikso.
3. Sidejo de inteligento kaj saĝo — Aparato kiu registras kaj reproduktas sonojn laŭvole *(SF)*.
4. Milfolio — Fajna ŝlimo trovebla en Rejno kaj norde de Ĉinujo.
5. 852 metroj, sur la maro ! *(SF)* — Esprima aspekto de la vizaĝo — Ĉe la orelo : sangpumpilo.
6. Malfermaĵoj.
7. Surŝipa ĉambreto — Blendi.
8. Cifero — Plurala pronomo — Ludkarto *(SF)* — Saltanta insekto nigra, kiu ofte vivas en bakejoj *(SF)*.
9. Sensimilaj — Duelektroda lampo.
10. Seksinklino al iu — Kuglego por kanono — komuna prepozicio sen difinita senco.
11. Krime mortigi *(SF)* — Rilata al mediteranea lando — Dua noto por la francoj, rusoj, italoj...
12. La plej granda osto el la koksosto — Besta intesto plenigita per hakita spicita viando el porko *(SF)*.
13. Demanda pronomo — Sako aŭ kesto — Revo de ĉiu figuranto *(SF)*.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

AKUZATIVO POST PREPOZICIO


Prepozitivo estas deklinacia formo enkondukita de Prepozicio : ordinare tiu komplemento (nerekta aŭ adjekta) estas en **Nominativo.**

RIMARKO

Akuzativo post prepozicio okazas **NE pro la prepozicio,** sed pro **la Speciala Esprimota Ideo :**

1) **Por montri Almovon :** la kato saltas sur la tablon — ŝi levas bastonon kontraŭ lin — ŝi ĵetas ambaŭ brakojn ĉirkaŭ lian kolon.
2) **Por montri ŝanĝon de stato :** kunpremi la manon en pugnon.
3) **Por distingi la rektan objekton de la subjekto :** Petro batis Paŭlon anstataŭ Vilhelmon (Vilhelmo estas la batato, ne la batanto).
4) **Post PO kiam ĝi rolas kiel numerala afikso** (sed pli bone esprimi ĝin en kunmetaĵo) : al ĉiu li donis **pokvin dolarojn ;** ili eltrinkis **podu** botelojn.
5) **En esprimo de proksimuma taksado** (PIV)

— ĉirkaŭ tri horojn daŭris la koncerto ;
— li povis loki en la domo du ĝis kvar homojn.



Fremda lingvo

Frederiko, vi malbone uzis vian vortaron ; Vi diris : « Kiel Noe en sian arkon akceptis podu estatoĵn el ĉiu specio, same tiu vilaĝeto invitis podu kretanojn el ĉiuj najbaraj urboj ». Vi intencis diri « Kristanoj » !



Kien vojaĝi ?

Mi bedaŭras, Sinjorino, mi montris ĉion al vi : estas la landoj malkrovitaj ĝis hodiaŭ, en kiujn vi povas aŭtoĉare aŭ aviadile vojaĝi. Ja vi povas atendi la revenon de la lun- dezert- ĝangalkaj praarbaraj esploristoj !



Kiom da homoj, tiom da gustoj

La alpistoj bezonas 3 ĝis 4 tagoj por surgrimpi tiujn montojn. Tiom da neutila laceco ! Tiom da tempo perdita ! Kaj kiom pli bela kaj vastas estus la plejzaĝo se oni povus transformi tiujn amasojn da rokoj en ebenaĵon !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (50 pencoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (6 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (6 dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier — Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 6 de 1975, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le compte-rendu de la dernière réunion du Conseil d'administration de la Maison Culturelle paraît dans ce numéro. En le lisant vous pourrez voir que les disponibilités permettent cette année de faire quelques travaux. En particulier, il ne devrait plus rester que deux chambres sans eau chaude. Les chambres 2, 3, 4 et 5 seront entièrement refaites ainsi que le circuit d'alimentation électrique du 1er étage. Les travaux de la grande salle se poursuivent. Le plafond a été remis à neuf et les portes et fenêtres repeintes. Les murs n'attendent plus que le revêtement de tapisserie. Auparavant le sol de brique devra être décapé. Il ne manquera plus que les rideaux et l'écran. Encore quelques dépenses importantes en perspective.

Le calendrier des stages 1976 a été établi. Aux vacances de printemps il n'y aura qu'une semaine d'activités, la seconde ayant depuis quelques années réuni un nombre très réduit de participants, nombre insuffisant pour couvrir les frais car les dépenses de chauffage sont élevées. Pour l'été nous nous en tenons au découpage habituel en trois stages de trois semaines chacun. Au cours de la première période aura lieu une rencontre d'enseignants de l'Ecole Moderne qui viendront apprendre l'Esperanto ou parfaire leurs connaissances dans la langue dans le but de participer plus valablement à la rencontre internationale du mouvement qui se tiendra en Pologne deux semaines plus tard.

La deuxième période sera consacrée à des conférences comme les années précédentes mais à la suggestion de quelques participants de l'an passé aura lieu un cours d'Esperanto par une méthode directe, destiné aux personnes moins bien armées pour profiter pleinement des conférences. Aucun changement n'est apporté au contenu des première et troisième périodes.

Nous espérons que la première semaine des vacances de printemps consacrée à des cours et à la pratique de la langue ainsi qu'à une rencontre de jeunes espérantistes de 9 à 15 ans, réunira un plus grand nombre de participants que l'an dernier.

Vous tous pouvez assurer le succès de la saison 1976. Retenez vos chambres dès maintenant. Les demandes sont déjà nombreuses. Demandez notre programme. Communiquez-le à vos amis. Merci.

P. BABIN.

NOTRE REVUE

L'augmentation importante du tarif des abonnements a sans doute surpris quelques amis. Mais un déficit important dû à l'augmentation du prix du papier, des frais d'impression et des frais de poste nous y a obligés. Depuis notre précédente augmentation le prix de revient de chaque numéro a doublé. D'autre part les timbres-poste et les diapositives envoyées de certains pays sont extrêmement difficiles à vendre.

Déjà de nombreux amis nous ont réglé leur abonnement 1976 et ont donc compris nos difficultés. Mais il en est qui ont oublié de régler leur abonnement 1975 bien qu'ayant accepté tous les numéros parus. Nous demandons instamment aux personnes qui n'auraient pas l'intention de renouveler leur abonnement pour 1976 de bien vouloir nous le faire savoir très vite afin de nous éviter des frais inutiles d'impression et de port. Merci.

—★—

ABONNES BIENFAITEURS 1975 (suite)

F-ino H. Chaillou (17)	25,00
S-ro Curnelle (59)	25,00
S-ro Ringotte (59)	20,00
S-ino Michaud (45)	30,00
S-ro Rabin (49)	20,00
S-ro Ricklin (44)	30,00
S-ro Guillon (45)	30,00
S-ro Igigabel (53)	20,00
S-ino Cortes (44)	25,00
S-ro Frangeul (49)	25,00
S-ro Cuvelier (59)	30,00
S-ro Cambillard (91)	40,00
S-ro Journet (21)	25,00
F-ino Baubonne (52)	25,00
TOTAL	**370,00**

ABONNES BIENFAITEURS 1976

F-inoj Kraemer (68)	30,00
S-ro Kraemer (54)	30,00
S-ino Tissot (42)	35,00
S-ro Lelogeais (14)	30,00
S-ro Rabin (49)	30,00
F-ino Lemonnier (92)	50,00
S-ro Saudian - Rousseau (95)	50,00
S-ro Binche (37)	30,00
S-ro Mak Edery (06)	50,00
S-ro Baronnet (36)	30,00
S-ro Pons (09)	30,00
S-ro Moreau (33)	30,00
S-ro Raynaud (30)	30,00
S-ro Canet (89)	30,00
S-ro Poly (75)	30,00
S-ro Amouroux (66)	30,00
S-ro Robert (13)	30,00
TOTAL	**575,00**

—★—

RESULTATS DES EXAMENS

Atesto pri Kapableco

Boyet Henri, Mas Emile, Parisot Georges, Simonet Jacques, Thon Germaine, Vanola Jean-Luc.

—★—

NOS PEINES

Madame Stuit, épouse de notre ami Sipke Stuit qui nous a quitté il y a quelques années, est décédée le 20 novembre.

Ses enfants voudront bien trouver ici l'expression de notre sympathie.

—★—

NOS JOIES

Nous apprenons le mariage de Claude Nourmont, membre du bureau de l'U.F.E. et de Brian Moon, le 29 octobre 1975.

Nos meilleurs vœux aux nouveaux époux.

Tous nos compliments à nos amis de Nantes, Cortes, pour le mariage de leur fils Miguel, ainsi qu'à nos amis Dénes pour le mariage de leur fille.

Tous nos vœux aux heureux époux.

CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 19 OCTOBRE 1975

La séance est ouverte à 10 heures.

Sont présents : Mmes et MM. Babin, Bénistant, Boyer, Cheverry, Dairon, Guillot, Jacquesson, Jelenc, Mathé, Métivier, Micard.

Sont excusés : Mmes et MM. Chevalier, Coussé, Bodereau, Guillaume, Philippeau, Prévot, Vazon.

Madame Thierry a envoyé sa démission de conseiller technique.

I. - STAGES DE L'ETE 1975

Premier stage. — La participation a été particulièrement nombreuse, de 90 à 120 stagiaires, 100 en moyenne. Les cours ont été convenablement suivis. Le groupe des enseignants s'est mieux intégré à l'ensemble du stage que l'an passé. Il y a eu beaucoup d'élèves mais peu se sont présentés aux examens. Les activités annexes ont été bien suivies. Dans l'ensemble, un stage très homogène dont l'administration a été assurée sans problèmes.

Deuxième stage. — En moyenne 70 participants. Ces semaines internationales n'ont pas vu plus d'étrangers que le stage précédent. Les conférences ont été très variées, bien suivies avec des discussions parfois très animées. Dans l'ensemble un stage qui s'est déroulé agréablement. La canicule a rebuté les excursionnistes

et il n'a pas été possible d'organiser des circuits par car.

Troisième stage. — En moyenne 70 participants également. Stage sans problème administratif particulier. Plusieurs excursions intéressantes. Veillées très riches en chansons et théâtre. Activités culturelles très variées dont gymnastique féminine chaque matin. Le personnel a été tout juste suffisant pour le service des repas. M. Mathé fait remarquer qu'il n'y a eu pratiquement que 14 journées de cours.

A ce sujet, le Conseil d'administration décide de prolonger la durée des cours et qu'en particulier il y en aura le dimanche comme cela se faisait il y a quelques années. Il n'y aura qu'une journée de repos par semaine qu'il y ait excursion ou non. Les cours devront se dérouler en dehors du château ainsi que les activités annexes afin que les salons restent un lieu de repos pour lire ou écouter des disques, etc... Il y a suffisamment de salles dans les dépendances pour assurer toutes ces activités.

II. - SAISON 1976

Printemps :

Une semaine de stage. Administration assurée par M. et Mme Babin. Rencontre d'enfants avec M. Lemagadure et M. Boyer. Cependant le château sera ouvert pour d'autres stagiaires adultes ou d'enfants accompagnés.

Eté :

— 1er stage : Administration assurée par M. et Mme Babin. Arrivée vendredi 2 juillet - départ jeudi 22 juillet. Trois cours habituels, plus stage Freinet pour un groupe d'enseignants.

Activités de loisir.

— 2e stage : Semaines Internationales du 23 juillet au 12 août. Administration : M. et Mme Dairon. Conférences. Pour la première fois cette année un cours pour débutants par la méthode directe sera assuré.

Activités annexes non encore définies.

— 3e stage : A partir du 13 août. Administration assurée par M. et Mme Guillot. 3 cours et diverses activités annexes.

— Durant la première semaine de septembre, il est prévu un stage Freinet.

Quelques stages de courte durée ou passages sont prévus entre Pâques et les stages d'été. Afin de soulager les administrateurs habituels, M. Babin adresse un appel aux membres du C.A. pouvant diriger un stage à cette période. Il les prie vivement de se faire connaître.

III. - QUESTIONS DIVERSES

Elections :

M. Babin fait remarquer que les candidatures tardives pour le renouvellement des membres du C.A. ne permettent pas de faire connaître aux actionnaires la liste complète des candidats. En conséquence, le C.A. décide que la limite de dépôt des candidatures soit fixée au 1er février.

Finances :

Recettes séjours : environ 170 000 frs, en augmentation de 40 %, due au nombre plus grand des participants et à l'augmentation de 12 % des tarifs.

Inscriptions en augmentation également.

Ventes diverses, tickets : 12 700 frs contre 7 000 frs en 1974 ; librairie : 13 000 frs au lieu de 9 000 frs.

Dépenses : Elles ont augmenté en librairie à cause du renouvellement de cartes postales et souvenirs.

Les salaires ont subi une augmentation de 15 %.

Les frais de publicité ont également augmenté.

Les dépenses d'alimentation ont augmenté de 30 %.

Disponibilités au 14 octobre :

— C.C.P., environ	15 000 frs
— Banque	36 000 frs
— Caisse d'Epargne	68 000 frs
— Caisse	73 000 frs
soit un total approximatif de	**117 000 frs**

La situation financière s'avère bonne, grâce à l'augmentation très nette des séjours.

La revue Kulturaj Kajeroj :

Les frais d'envoi et d'impression du journal ont considérablement augmenté, si bien qu'il devient nécessaire de réajuster le prix des abonnements. Il faudra peut-être aussi abandonner le service du journal à certains abonnées des pays de l'Est qui règlent avec des objets parfois sans grande valeur marchande, timbres, diapositives, etc... Dans un premier temps il leur sera proposé un autre mode de règlement. De toute façon, il est décidé d'augmenter le prix de l'abonnement à 25 frs et 30 frs.

Travaux :

Les disponibilités vont permettre de continuer les aménagements divers en cours, en particulier l'alimentation électrique du premier étage.

La réfection des chambres 3 et 4 est commandée. Le devis approximatif de l'ensemble est de 40 000 frs.

M. Bénistant, secrétaire du G.E.E. fait part au C.A. que ce groupe a décidé de rééditer la grammaire de Baronnet sous les auspices de la M.C.E. et du G.E.E. Le G.E.E. engage les frais d'édition, et la M.C.E. lui achètera un certain nombre d'exemplaires au prix de revient.

Il manque un prospectus publicitaire sur la Maison Culturelle. Un nouveau texte sera rédigé prochainement et édité.

M. Babin informe le C.A. que des dons ont été adressés. Le Conseil d'administration remercie vivement les deux organismes suivants :

— l'Institution Hodler qui a fait un don de 800 frs.

— La Internacia Esperanto-Instituto qui a offert un crédit de 250 florins pour acheter des livres.

M. et Mme John Rapley ont offert à la M.C.E. une souscription à la réédition de « Literatura Mondo ». Le Conseil d'administration leur adresse un remerciement tout particulier.

Après discussion, les membres du C.A. ont décidé de faire exécuter le traitement de la charpente et des boiseries de la salle à manger par insecticide selon un devis de 3 000 frs environ.

Tarifs des séjours :

Une augmentation de 10 % est décidée afin de faire face à la progression du coût de la vie.

A la demande de Mme Cheverry, les bancs des salles de cours seront remplacés par des chaises.

La séance est levée à 16 h. 30 .

Le secrétaire de séance :
Guy DAIRON.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,50 F.
couleur :	0,70 F.
Cuillères de collection :	12,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Commandez-nous

AMUZAJ DIALOGOJ

Modela Prononco

de la interlingvo Esperanto

10 F. + port

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET

« La Timeraie »

VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : **10,00 Fr.**